

LEA/G – INFORMILO

(MAGAZINO)

Organ des Freien Esperanto-Bundes in deutschsprachigen Gebieten

Libera (Laborista) Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj

Enhavante paĝojn de *La Socialisto*, organo de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista

Fondita (gegründet) 1956

Eldono nro.5

1-a jarkvarono 2004



Milito ne estas solvo de problemoj!

Henry Dunant (1828-1910)

Laŭreato de paco, fondinto de la Ruĝa Kruco, diris: "La malamiko, nia vera malamiko, ne estas la najbara lando, sed malsato, malvarmeco, malriĉeco, manko de scioj kaj antaŭjuĝoj.

Anstataŭ interpreti la manojn, la homoj incitas unu la alian per blinda ŝovinismo, absurda sensenca sang-avido kaj vere mortiga kruelo."

Ni estas amikoj, ni interkomprenas nin, ĉar ni uzas unu komunan lingvon, la lingvon internacian ESPERANTO, kaj krom tio, ni aktivigas en la mondvasta unuiĝo de dependaj laborprenantoj, en S A T – Sennacieca Asocio Tutmonda, kiun fondis E.Lanti 1921: Kompreno kaj toleremo rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj en aliaj landoj.



Henry Dunant,

Gründers des Roten Kreuzes,

sagte

„Der Feind, unser wirklicher Feind

ist nicht irgendein Nachbarland,

sondern Hunger, Kälte, Armut,

Unwissenheit und Vorurteil.

Statt einander die Hände zu reichen,

stacheln sich die Menschen gegen-

seitig an in blindem Chauvinismus,

sinnlosem Blutvergießen und wahr-

haft mörderischer Grausamkeit.“

Wir sind Freunde, wir verstehen uns, weil wir eine gemeinsame internationale Sprache, ESPERANTO, die leicht erlernbare, moderne Weltsprache benutzen, uns treffen auf Weltkongressen, die auch der Weltbund der Arbeitnehmer – S.A.T. Sennacieca Asocio Tutmonda, Sitz Paris, veranstaltet. Der Bund ermöglicht persönliche Kontakte zum Beispiel durch die *Freundschaftskette – Amikeca Reto*, und vieles mehr.

Einzelheiten erfährt man bei

Jiri PROSKOVEC, Dortmund

ePost: proskovec@yahoo.de

Konto: 4907 664 100 Norisbank Dortmund

(BLZ 760 260 00)

Gary MICKLE, Berlin

GMICKLE@NEXGO.DE

Albert STEPHAN, Renchener Str.47

(DE) 77704 Oberkirch (Baden)

Konto: 629867-806 Postbank München

(BLZ 700 100 80)

Eldonanto – Herausgeber

Libera (Laborista) Esperanto-Asocio
en germanlingvaj regionoj (LEA/G)
Freier Esperanto-Bund
in deutschsprachigen Gebieten
Sekretario: Jiri PROSKOVEC
Heimbastr.10, (DE) 44143 Dortmund
Tel: 0231/551211

ePost: proskovec@yahoo.de

LEA/G-Konto: PROSKOVEC, Jiri
Nro.4907 664 100

(Europa-Kennz.: IBAN-DE 53 7602
6000 4907664100

BIC: NORS DE 71)

Norisbank Dortmund (BLZ 760 260 00)

Redakcio LEA/G-Infomilo

Renchener Str.47 (DE)77704 Oberkirch

Resp. A.F.STEPHAN

Kunlaboras: K.H.KERSTING, Essen

Hans Rodewig, Hannover

Redaktas la interretan **MAGAZINO-n**

Gary MICKLE, Brüsseler Str.6

(DE)13353 Berlin

Retadrs.: GMICKLE@NEXGO.DE

LEA/G-Infomilo aperas du – ĝis kvarfoje jare

Membreco/Mitgliedschaft en LEA/G :

8 € jare (inkluzivas liveradon/Lieferung

de la infomilo kaj aliaj servoj/and.Dienste

Nura abono 10 € (kvazaŭ donaco!)

Ligata: ASLE – Aŭstria Socialista Ligo

Esperantista, Vieno (Wien)

Organo: LA SOCIALISTO

(aperas en la infomilo de LEA/G)

p.adrs. Reinhold Kammler

Karl-Beck-Gasse 3/2 A-1220 Wien

Kto: Bund Sozialistischer Esperantisten

PSK 2 412 263

Pri la enhavo de sia teksto respondecas

la ensendanto mem. La redakcio rajtas,

mallongigi tekstojn kiam mankas spaco,

aŭ ne akcepti ilin

LEA/G ricevis:

organojn, revuojn, gazetojn de jenaj
Esperanto-grupoj –

SAT-Amikaro Parizo

Esperanto-

La Verda Proleto, SATEB-Londono

TRENHA de Dro.Albault, Tuluzo

C E V Paduo

Ethikschutz-Initiative Dr.Emde

Mallonge de L.Giloteaux, Croix

Kajero de la Sudo, Murcio

KAE-Infomilo Sabadelo

SLEA-Infomilo, Stockholm

Sennaciulo de SAT

Litova Stelo, Kaunaso

LA SAGO de SAT-Amikaro

Amikan dankon ! Ni permesas al ni
publici interesajn tekstojn en nia
infomilo.



En la lasta eldono...

aperis en la rubriko > Apernotoj <
ne korekta konto-numero de la
asocio. Korekt'estas:

Jiri Proskovec, Dortmund

Konto: 4907 664 100

Norisbank Dortmund

(BLZ 760 260 00)

Kiu de vi, karaj gemembroj, jam
ĝiris la kotizon 2004 al la erara
konto, intertempe ricevis la
monon sen komentario. Ni
ĝustatempe antaŭ la fino de la jaro
informis la bankon pri la eraro. Laŭ
ĝi maŝina prilaboro aŭtomate
reĝiras la sumon.

Ni tre bedaŭras kaj petas pri vian
pardonon.

Stephan

Protestojn, laŭdojn pri...

la enhavo de la infomilo-eldonoj bv.
leterskribi al la respondeca redak-
tanta:

A.F.Stephan, Renchener Str.47

(DE) 77704 Oberkirch (Baden)

Dankon !

Kiam la redakcio ...

aĉetis novan komputilon, ĝi informis
i.a. la vendiston pri la gazeta laboro.
Pro tio ĝi prezentis ekzempleron de
la infomilo.

Ŝajne la programisto opiniis, ke
nia Esperanto estas itala. Pro tio li
instaligis en la tasko 'Autokorektur'
apud la germanan kaj anglan ankaŭ
la italan. La redakcio, do, konstatis,
ke vortoj kiuj komencas per 'k'
montras 'c' aŭ 'g'. La gramatika fino
'into' aperis kiel 'ino' kelkfoje.

La redakcio nun estas sur la vojo,
ĉi tiun italan aŭtomat-korekton finigi.
Esperas, ke la venonta eldono (en
aprilo/majo) aperos sen eraroj.

Stephan

La kotizo 2004...

estas 8 € kiel ĝis nun. La asocio
ĝojos, kiam vi aldonos donacon.

La kotizo entenas regulan
liveradon de la infomilo kaj aliajn
servojn.

La redakcio bonvenas ĉiam
tekstojn por la infomilo, eĉ tiaj, kiuj
estas skribitaj en germana lingvo.
Ni tradukos ilin.

Feliĉan kaj sukcesan
2004

deziras al vi
sekretario, konsilantoj kaj
redakcio de
Libera Esperanto-Asocio
en germanlingvaj regionoj

Proskovec, Bues, Rodewig, Stephan

Der Esperanto-Buchversand für
LEA/G

Dr.Wolfgang Schwanzer

informiert über die neuesten

Bücher, die in Esperanto auch in
deutsch erschienen sind.

Die Bücherliste sollte man
anfordern:

Pfarrer-Seeger-Str.9

55 129 Mainz

Tel/Fax (abends) 06136/46232

Retadrs. wolfgang.schwanzer

@esperanto.de

Krom tio estas ebla ricevi librojn ĉe
S.A.T., Parizo

Ni ricevis...

de Margot Weichmann, Dortmund, jenan informon el Westfälische Rundschau (28.11.03):

Rick Braun

Esperanto

Nach der Weltsprache Esperanto hat Jazz-Trompeter Rick Braun sein neues Werk benannt: Denn in seiner Musik sieht der mehrfach preisgekrönte Amerikaner, der gern in die Schublade des Smooth (sanften) Jazz gesteckt wird, ein universelles Mittel zur Verständigung. Das fällt bei Instrumentals natürlich ungleich leichter als bei Vokalmusik. Zehn Titel von „Green Tomatoes“ bis „Mother's Day“ enthält Brauns' elftes Album: Jeder einzelne überzeugt durch Ausdruck und Seele; mal funky, mal sentimental. In seinen besten Momenten erinnert der Trompeter an zwei ganz Große: An Miles Davis, was Präzision und Klarheit angeht, sowie an die gefühlvolle Entspanntheit eines Chet Baker. Hörenswert! **Frank Grieger**



Margot, elkoran saluton kaj dankon!

de Hans Jankowski, Dortmund, leteron kaj materialon por la informilo. Jen eltiro:

...Dankon por la LEA/G-Infomilo. Mi ricevis nroj. 1 kaj 4. Pri nroj. Pri 3 kaj 4 mi ne trovas signojn ĉe mi. Eble ili malaperis. Per tiu ĉi poŝto mi sendas al vi kajeron pri Esperanto-poŝtmarkoj. Mi faris nur dek ekzemplerojn, ĉar koloraj kopioj estas multekostaj ... Mi faris ĝin por instigi la Litovian Esperanto-Asociacion eldoni tiun memoraĵon dum la UEA-kongreso 2005 en Vilno. Mi aŭdis, ke ili klopodas kaj ŝajne sukcesos. – Mi ne preparis ĝin por vendi (*kaj ne estas ebla venigi ĝin! La red.*)

En Nepal kaj Litovio estas multaj junaj esperantistoj, en Zamenhof-domo en Kaunas okazas ĉiam Esperanto-kursoj, ankaŭ en du lernejoj oni instruas ĝin. La abonon de la organo 'Litovia Stelo' multaj esperantistoj ne povas pagi, ĉar mankas la mono. Geesperantistoj, kiuj ŝatas subteni tiu progreseman asociacion, abonu la organon aŭ donaci abonon. Ĝi kosta 14 € jare por ses eldonoj.

(Bv. sendi abondeziron al A. Stephan, Renchener Str. 47, (DE) 77704 Oberkirch (Baden). Vi pagu post ricevo de la unua ekzemplero al Stephan)
Ĉu sro. Vulfoviĉ en Rastatt ankoraŭ vivas?

...favoran leteron de Radio Pekino kun aldonoj i.a. la revuon >MIKROFONE<. La redakcio de LEA/G-Infomilo petis la Esperanto-redakcion en Pekino sendi multe pli de tiu komunikilo. Kiam ilin ni sufiĉe frue ricevis, vi trovos ekzempleron aldone.

59-a Kongreso de S A T – Amikaro

La venonta kongresurbo de la asocio okazos en La Roche-sur-Yon. (1804-2004 Urbo ĉiam nova).je la 10 – 12 aprilo 2004).

Detaloj estos publikigataj ĝustatempe, ankaŭ en nia informilo.

Povas ja esti...

ke vi trovas erarojn, tamen la redaktanto faris ĉion por liveri perfektan legilon. Bv. informi nin pri eraroj. Compenso por viaj elspezoj estos esperantajo!

AFS

Al miaj samlandanoj

Vi homoj la militon postvivintaj,
Vi estu fine nun memkompatemaj!
Vi mizeruloj, estu nun pacemaj!
Sufiĉas militiroj jam estintaj:
Mi petas, estu al vi kompatemaj.

Vi viroj, prenu trulon, ne tranĉilon!
Vi sub tegmentoj sidi ĝis nun restus,¹⁾
Se vi tranĉilon ne prenintaj estus.
Kaj sub tegmentoj havus vi trankvilon.
Mi petas, prenu trulon, ne tranĉilon!

Infanoj, al la patroj kaj patrinoj
Vi diru laŭte, ke la militadon
Al vi domagu ili, saman suferadon
Ne volas vi, nek loĝi en ruinoj.
Al vi domaĝu ili militadon!

Patrinoj, ĉar vi havas ja la forton,
Armadon kaj militon ne toleri,
Vi lasu vivi la infanojn, ne suferi!
Naskiĝon ili al vi danku, ne la morton!
Patrinoj, lasu la infanojn ne suferi!

Verkita de Breĥto, Bertolto (1898 - 1956).
Esperantigis: Manfredo Ratislavo
en Februaro de 1997 laŭ la origina
germanalingva teksto.

Esperanto-lekcio

Die Zamenhofsche Tabelle

ki – kie (wo), kiu (wer) kiam (wann) kio (was)
kia (wie beschaffen) kiel (auf welche Weise)
kiom (wie viel-e) kial (warum) kies (wessen)

ti - tie (da, dort) tiu (der, jener) tiam (damals)
tio (das, jenes) tia (solcher, solche, solches)
tiel (so) tiom (so viele) tial (darum, deshalb)
ties (dessen, deren)

neni - nenie (nirgends) neniu (keiner, niemand)
neniam (niemals) nenio (nichts) nenia (kein)
neniel (keineswegs) neniom (gar nichts)
nenial (aus keinem Grund) nenies (niemandes)

i - ie (irgendwo) iu (irgendeiner, jemand)
iam (irgendwann, einst) io (irgend-etwas)
ia (irgendwelch, irgendein) iel (irgendwie)
iom (etwas, ein wenig) ial (aus irgendeinem Grund)
ies (irgend jemandes)

ĉi - ĉie (überall) ĉiu jeder, jedes, jede) ĉiuj (alle)
ĉiam (immer) ĉio (alles) ĉia (jederlei)
ĉiel (auf jede Weise) ĉiom (alles, das Ganze)
ĉial (aus jedem Grunde) ĉies (jedermanns)

Nach Gruppen

Ort – kie, tie, nenie, ie, ĉie

Person, benannte Sache – kiu, tiu, neniu, iu, ĉiu

Unbenante Sache – kio, tio, nenio, io, ĉio

Beschaffenheit – kia, tia, nenia, ia, ĉia

Art und Weise – kiel, tiel, neniel, iel, ĉiel

Menge – kiom, tiom, neniom, iom, ĉiom

Grund, Ursache – kial, tial, nenial, ial, ĉial

Besitzer – kies, ties, nenies, ies, ĉies

Die nächste Lektion erscheint in INFORMILO 6
im zweiten Quartal 2004

Vorto donita estas kiel leĝo -

Li estas sinjoro de sia vorto -

*Leganto, kiu povas traduki tiujn esprimojn, bv.
sendi ilin al la redakcio. Dank'per esperantaĵo!*

La redakcio demandis

kaj Friedel Bues, Hannover respondis !

(red. = redakcio, B – Bues)

red -Kiam vi komencis lerni Esperanton ?
B – mi lernis Esperanton komence de la jaro 1945

red - Kial vi lernis la lingvon ?
B – Mi lernis ĝin kvazaŭ kiel heredajo, ĉar mia patro jam estis Esperantisto kaj SAT-ano depost la unua mondmilito, kaj ĉar post la dua mondmilito mi opiniis, ke tio estus taŭga rimedo por eviti estonte novajn militojn.

red – Ĉu vi partoprenis Esperanto-okazaĵojn ?
B – Mi vizitis diversajn junularrenkontiĝojn, naciajn kaj internaciajn. Krome ankaŭ diversajn SAT-kongresojn nome tiujn de Stockholmo 1951, Dusseldorf 1952, Nancio 1954, Dortmund 1959, Hamburgo 1963, Karlsruhe 1965, Amersforto 1985, Bulonjo 1985, Illertiseno 1989, Strajnico 1994 kaj Augsburg 1997.

red – Kiam vi aliĝis al LEA/G ?
B – Al LEA/G mi aliĝis dum ĝia fondkongreso, se mi bone memoras en Frankfurto.

red – Kaj al S A T ?
B – Al S A T dum 1945 aŭ 1946 tuj kiam tio al germanoj eblis.

red – Ĉu vi havas aliajn hobiajn ?
B – Aliajn hobiajn mi fakte ne havas. Mi ŝatas migri, kaj legi kaj mi ĉefe interesas al politikaj temoj.

red – Kiel vi aktivas ?
B – En la unua tempo mi aktivis en la junularrondoj. En la germana Esperanto-junularo kaj poste ankaŭ en la S A T – junulfako. Post la fondo de LEA/G mi tie aktivis kaj apartenis dum kelkaj jaroj al ĝia estraro.

re – Amikan dankon, kamarado Friedel, por viaj informoj.

Friedel Bues estas unu de la fidelaj konsilantoj de LEA/G. (red)

Ĝangalo E-Portalo

Lanĉita en januaro 2003, la unua vera retportalo en Esperanto, kiu konstante ĝisdatiĝas pri diversaj novaĵoj ĉiutage.

La plej vizitata notico-portalo en la internacia lingvo.

Striko de la fervojistoj

Antaŭ nelonge la aŭstraj fervojistoj strikis dum kelkaj tagoj. Ili per tio batalis kontraŭ la plano de la popol-libereca registaro, disbati la aŭstran fervojon en pluraj firmaoj kaj anstataŭi la laborkontrakton de la fervojistoj per aliaj, malpli avantaĝaj.

La striko kaŭzis malfacilojn je la pasaĝeroj de la fervojo. Multaj homoj ne sukcesis ĝustatempe atingi sian laborlokon aŭ estis devigataj, veni al laboro per aliaj rimedoj, ekzemple veturi en aŭtomobilo kun aliaj kolegoj.

Estas konata, ke inter la aŭstraj esperantistoj estas multaj fervojistoj; la fervojistaro estis dekomence pioniroj de la Internacia Lingvo. Tial la sorto de la fervojistoj ne povas esti al ni egala.

La striko rezultis la sukceson, ke la registaro rezignis nuligi la ĝisnunajn laborkontraktojn, sed la fervojistoj ne sukcesis malhelpi la disbaton de la tuta fervoja strukturo. Pro tio la fervojistoj plu bezonas nian subtenon en sia batalo.

Ni ne rifuzu tiun subtenon, malgraŭ eventualaj malfacilaĵoj por ni mem.

Amikecon, gekamaradoj!

Reinhold Kammler

Gereimter Ärger

Infolge starter Rentnerschwemme
sind die Finanzen in der Klemme.
Zur Rettung wird jetzt reformiert
und wie folgt wird abkassiert:

Erst nach Verbrauch der Sparanlagen
darf man nach einer Rente fragen.
Der Staat zahlt keine Alimente,
ab 70 sperret er die Rente.

Den Zahnersatz musst du vergessen,
man kann auch ohne Zähne essen.
Die Kosten für ein Zahngebiss
sind sowieso ein Ärgernis.

Senioren darf man nicht mehr heilen,
weil sie sonst lang im Leben weilen.
Wer sich als Kranker weiterschleppt,
bekommt Arsen auf Arztrezept.

Die Obrigkeit in unserm Land
gibt dieses als Gesetz bekannt.
Sie dankt damit den vielen Alten,
um Deutschlands Wohlstand zu erhalten.

(Von Heinrich Ruhl, eingesandt v. H. Jankowski)

La redakcio serĉas esperantiston, kiu tradukos la supran poemon en nia lingvo ESPERANTO.

Krom tio ĝi ĉiam ĝoje akceptas komunikojn pri Esperanto el gazetoj, tekstojn el la mondo de la laboristoj, laŭsencajn poemojn ktp. multon oni povas trovi en interreto. La redakcio ankoraŭ estas posttempa, ĉar ne uzas interreton.

Informojn el la labormondo

Norvegio: Sindikatoj alvokas bojkoton de Ryanair.

Kenjo: Doklaboristoj urĝas parlamentanojn rejeti privatigon.

Israelo: Registaro kontraŭ sindikatoj.

Kamboĝo: Vestajo-laboristoj batalas kontraŭ policanoj.

Kanado: Radongaso en la minejoj.

Libanon: Malriĉeco devigas infanlaboron.

Aŭstralio: Atako kontraŭ laborrajtoj.

Dominikio: 7 homoj mortis dum striko.

USA (Usono): McDonalds koleriĝas pri "McJob".

(El interreto dec. 2003)

Interreto Ĝangalo informas el diversnaciaj gazetoj:

La banko HSBC en Britio maldungos laboristojn kaj anstataŭos ilin el dungotoj en aliaj landoj, precipe Hinda Unio, Malajzio kaj Ĉinio. Reprezentantoj de la dua plej granda banko en la mono, en kiu laboras 55 milaj personoj nur en Tritio, asertis, ke la maldungoj okazos inter la jaroj 2004 kaj 2006, tuŝonte precipe la pertelefonajn servistojn kaj tiujn laborante ĉe informadikaj sektoroj. – Per tiu ĉi ago, la banko sekvas la nuntempan strategion de grandaj britaj konzernoj, remuntante la strukturojn de 3 siaj aferoj en landoj, kiuj ofertas malplikostan laboristaron. La *British Telecom* kaj la financ-institucio *Goldman Sachs*, *Abbey National* kaj *Prudential* ankaŭ adoptis ĉi tiun taktikon, translokiĝi laborlokojn al evolulandoj.

(Intuicio de iu laboristo: "La salajro de la manaĝeroj ĉiam estas ekzakta. Anstataŭi ilin per profesiuloj el la tria mondo ne estas konsilinda, ĉar tiaj homoj certe ne akceptos la labormanieron de la lando.")

Kiu havas abelojn, havas mielon.

Korvo al korvo okulon ne pikas.

Ili neniam estas malriĉaj kiel almozuloj sub ponto.

La homo ne povas vivi en paco, kiam tio ne plaĉas al la najbaro.

Paĝoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)
Seiten der Österreichischen Sozialistischen Esperanto-Liga



Esperanto im Internet?

Liebe Genossinnen und Genossen, werte Leser!

Die neuen Technologien, und vor allem das Internet, haben die Übermittlung von Informationen heutzutage wesentlich verändert. Auch Esperanto darf sich dieser Tendenz nicht verschließen. Wir stellen daher die Überlegung an, die Information unserer Mitglieder sowie aller Menschen, die Interesse an Esperanto haben, zusätzlich unseres 'Socialisto' auf eine neue Basis zu stellen. Wir denken da an eine Webseite, wahrscheinlich in Zusammenarbeit mit anderen Esperanto-Organisationen, aber auch die Übermittlung aktueller Informationen über E-Mails.

Wir wissen, dass vielen unserer Mitglieder dieses Medium nicht zur Verfügung steht. Wir haben auch keineswegs die Absicht, unsere Informationen auf bedrucktem Papier einzustellen. Wir benötigen jedoch Informationen darüber, welche unserer Mitglieder und Leser über einen Zugang zum Internet bzw. eine E-Mail-Adresse verfügen.

Aus diesem Grund ersuchen wir Sie, in diesem Falle an die Email-Adresse

kammler@inode.at

ein kurzes Mail zu senden.

Vielen Dank für Ihre Mitarbeit

Aŭstria Socialista Ligo Esperantista
Vorstand

(Mallonga laŭsenca traduko por eksterlandaj geesperantistoj: Novaj teknologioj ekz. la interreto prezentas eblecojn, informojn pli rapide transsendi. Esperanto ne malkonfesu sin pri ĉi tiu tendenco. ASLE intencas transsendojn de informadoj pri Esperanto ĝenerale kaj el Aŭstrio meti sur nova bazo: per WEB-paĝo kaj ankaŭ per E-majlo. Por efektiviĝi tion ASLE petas la membrojn kaj ĉiun leganton informi la asocion, ĉu oni havas aliron al interreto resp. disponas pri E-Mail-adreso. Tamen: La paĝoj de ASLE en LEAVG-Infomilo pluen aperos por tiuj legantoj, kiuj ne posedas interreton resp. E-majlon. La redakcio)

LEAVG jam dum kelkaj jaroj informas pri Esperanto kaj movadoj per interreto. Respondecaj pri tio nia amiko Gary Mickle, Berlin. Bv. legi en 'Apernotoj' (paĝo 2).

La bela okcidento de Ĉinio bonvenigas vin

Nun estas la speciala programero por la konkurso de scioj pri la okcidento de Ĉinio sub lka titolo "Cultura Vojaĝo al la Okcidento de Ĉinio".

Kompare kun la oriento de Ĉinio, la okcidento estas iom postiginta je ekonomia dissolvo kaj loĝata maldense, tamen tiu vasta tero posedas estreme riĉan turisman fonton.

El la 34 provinc-nivelaj administraj regionoj de Ĉinio, 12 estas en la sfero de la okcidenta landparto. Ili kovras du trionojn de la totala ĉina teritorio. Sur la vasta tero lokiĝas diversaj naturaj pejzaĝoj kaj sennombraj historiaj restaĵoj, postlasitaj de la kelkmiljara historio de la ĉina civilizacio. El la pli ol 50 naciminoritatoj de Ĉinio pli multaj loĝas tie. Iliaj naciecaj moroj estas buntaj, tre ĉarmaj. Kun tiu faktoroj la turisma fonto de la regiono estas neimageble riĉa. Nur dek pejzaĝoj en la okcidento de Ĉinio sin trovas en la katalogo de la mondaj heredaĵoj de UNUESCO.



La unua estas natureco, alivorte primitiveco. En la okcidento estas riĉa turisma fonto: monto, rivero, kaverno, stepo, barbaro, templo, antikva restaĵo, nacieca moro ktp.. Preskaŭ ĉiu el ili tenas sian primitivan staton. Tial ili estas tre allogaj kaj ne anstataŭigeblaj. La dua estas aparteco, alivorte specialeco, monopoleco. Ĉi loko de la okcidento havas sian originalecon, neniel ripeteblan, absolute monopolan, ne anstataŭigeblan. La tria estas diverseco. Oni povas trovi la turisman fonton kaj pejzaĝon kiun ajn vi deziras en la okcidento.

La plej neforgesebla pri la okcidento estas la fonto de la Yangzi-rivero, la plej longa rivero de Ĉinio. Tie oni povas aŭdi originalajn kantojn de knabinoj sur altebenaĵoj kaj tiujn de paŝtistoj, laŭtajn kaj sonorajn, ne kompareblajn de ordinaraj kantistoj. Ankaŭ la provinco Qinghai estas neforgesebla. Tie estas bela lago, en kiu kuŝas insulo de birdoj. Tie dislokiĝas ankaŭ famaj temploj.

Menciinda ankaŭ la Interna Mongolio. Ĉu sur stepo, ĉu sur deserto, nokte oni povas vidi brilajn stelojn en la firmamento, kvazaŭ parolantajn al ĝi. En aŭgusto turistoj povas partopreni en sportkunvenon de la lokanoj de Nadamu. Oni trinkas ĉevallaktan vinon, manĝas ŝafajon per mano, akompanate de kantoj de mongolaj knabinoj. La sento estas proskribebla nur per la vorto : ebria.

En la Naxi-nacieca Aŭtonoma Gubernio Lijiang, sudokcidenta Ĉinio, estas orkestro el naxi-aj maljunuloj, kiuj ludas muzikaĵojn antaŭ centoj da jaroj,

jam malaperintaj en aliaj lokoj, per antikvaj instrumentoj, ne plu trovintaj en aliaj lokoj. Tiu antikva muziko jam fariĝis faman turisman programon de la loko.

Kun la senĉesa plibonigo de la trafilo kaj komunikada instalaĵo de la okcidento de Ĉinio, pli kaj pli multaj turismaj fontoj estas konataj kaj admirataj de pli kaj pli multaj homoj, ekzemple la maŭzoleo de la unua imperiestro de Qin-dinastio kaj la kavoj kun terakotaj militistoj kaj ĉevaloj en la provinco Shaanxi, la antikva urbo Lijiang en la provinco Yunnan, la kaverno Magao en Gansu, la palaco Potala en Tibet, la pajcaĵo Jiuzhaigou en Sichuan ktp.

Multaj belaj lokoj atendas vin. La lokaj turismaj oficejoj ekspluatas diversajn turismajn programojn: ekologiaj, kulturaj, folkloraj kaj religiaj. Kompreneble oni atendas ankaŭ eviti kaj redukti la damaĝon de la turisma ardo al la ekologio kaj medio de loko.

Esperanta Redakcio de Ĉina Radio Internacia

Esperanto-Redakcio

de Ĉina Radio Internacia, Peking

el donas informilon **MIKROFONE**. En ĝi informoj el Ĉinio, leteroj de legantoj, tra la mondo kaj horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio.

Adrs. CRI-36 Ĉina Radio Internacia, testo 4216

Pekino Ĉinio 100040 Tel: +86(10)68891940

Fax: +868(10)68891941 Ret: eespradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.com.cn>

UTC 19,30 – 20,30 Eŭropo *ondoj 30, 36, 25, 40 kHz 9880.11810*

*El la gazeto
LITOVA STELO
2/2003*



Monumento de L.Zamenhof en Veisiejai

Was ist Politik ?

Der kleine Sohn geht zum Vater und fragt ihn, ob er ihm erklären könne, was Politik sei. Der Vater meint: „Natürlich kann ich dir das erklären. Nehmen wir mal zum Beispiel unsere Familie. Ich bringe das Geld nach Hause, also nennen wir mich Kapitalgeber oder Kapitalist. Deine Mutter verwaltet das Geld, also nennen wir sie Regierung. Wir beide, Vater und Mutter, kümmern uns um dein Wohl, also bist du das Volk. Unser Dienstmädchen ist die Arbeiterklasse, dein kleiner Bruder, der ja noch in den Windeln liegt, ist die Zukunft.“

Der Sohn ist sich nicht ganz sicher und möchte erst einmal darüber schlafen.

In der Nacht wird er wach, weil sein kleiner Bruder schreit – er hat in die Windeln gemacht. Er steht auf und klopft an die Tür zum Elternschlafzimmer. Seine Mutter liegt im Tiefschlaf und lässt sich nicht wecken. Wo ist der Vater? Das Dienstmädchen könnte ja dem kleinen Bruder helfen. Er klopft an deren Zimmertür und, da er nichts hört, öffnet er die Tür eine Spalte und lauert ins Zimmer. Da liegt sein Vater mit der Arbeiterklasse im Bett. Die beiden lassen sich nicht stören. Der Bub geht wieder ins Bett, schläft weiter.

Am Morgen danach fragt ihn der Vater, ob er nun wisse, was Politik ist und mit eigenen Worten erklären könne.

Der Sohn antwortet: „Ja, ich weiß es jetzt. Der Kapitalismus missbraucht die Arbeiterklasse während die Regierung schläft, das Volk wird total ignoriert und die Zukunft liegt in der Scheiße.“

(Eingesandt v. H.Jankowski, Dortmund)

Mallongaj informoj

La aplikado de neŭtrala laborlingvo kaj tradukado, kiu ne estas ligita al politika ekonomia forto, povus Parigi al la Eŭropa Unio

imensajn sumojn, malakrigi la premon de la angla sur aliaj lingvoj kaj amplekse kontribui al la protektado de demokrata plurlingveco. Tia lingvo estus lernonta kiel fremdlingvo same de ĉiuj EU-civitanoj. Tio kreas egalajn rajtojn en la internacia komunikado.

Tia lingvo ekzistas. Ĝi pruvis sin taŭga en la praktiko ek de pli ol unu jarcento :

ESPERANTO !

(Traduko) Kio estas politiko ?

La eta filo demandas la patroin, kio estas la politiko.

„Kompreneble mi povas klarigi tion. Rigardu ekzemple nian familion: Mi alportas la monon, pro tio mi estas la kapitaldonanto aŭ kapitalisto. Via patrino administras la monon, do, ŝi estas la registro. Ni ambaŭ prizorgas vin, sekve vi estas la popolo. Nia servistino estas la laborista klaso kaj ĉia malgranda frato, kiu ankoraŭ kuŝas en vindotukoj, estas la estonteco. Ĉu vi komprenis?“

Por kompreni tion, la malgrandulo volas unue dormi. Li elreviĝas dum nokto, ĉar la eta frato mal-



sekigis la vindotukon kaj krias. Li frapas al la pordo de la gepatra dormejo. Sed, aŭdas nenion. Li vidas, ke nur la patrino estas en la lito, ŝi forte dormas.

Kio estas la patro? Povas ja helpi la servistino. Li frapas al la pordo de la ĉambro de la servistino, sed nenion li aŭdas. Li spionas en la ĉambron kaj vidas, ke la patro kuŝas en la lito kune kun la servistino. Li iras en sian liton.

Venontan morgaŭon la patro demandas, ĉu li nun komprenas la politikon. „Jes, la kapitalisto misuzas la laboristan klason dum la registro dormas. La popolo estas ognorata totale kaj la estonteco kuŝas en la merdo.“

(trad. Stephan, kontrol. Rodewig)

(alsendis H.Jankowski, Dortmund)

Per la internacia lingvo Esperanto

jam nuntempe komunikas homoj tutmonde. Esperanto pruvis sin taŭga en ĉiuj kampoj de internacia komunikado, beletristiko (originala k tradukitaj), scienco, libertempo, muziko, arta esprimo, familia lingvo.

Esperanto, die internationale Sprache, ist älter als einhundert Jahre ! (seit 1887)

Umberto Eco (Eko), Schriftsteller, Philosoph, Nobelpreisträger, sagte (in seinem Buch: ‚Die Suche nach der perfekten Sprache‘) dass Esperanto eine gut geschaffene Sprache ist, welche gut gebraucht werden kann als Zweisprache neben der Muttersprache.